**AVENO # 40 - AGADO de AVE kaj de AVEanoj**
Januaro - Decembro 2014

Jen gheneralaj informoj pri AVE kaj aliaj CSO-oj kaj
diversaj peticio-petoj, aliaj trovighas je Ekologio & Homaj Rajtoj

**La kotizo por AVE** estas libervole paginda - proponite: 5 EUR jare, pli au malpli eblas.
Nia UEA-Konto: avex-z; Konto de UEA: IBAN: NL72INGB0000378964, BIC: INGBNL2A
Noto: (de "via nomo" por Kto. **avex-z**)
Elkoran dankon – Manfred Westermayer, la sekretario.
**Adreso:** AVE, Kandelstr. 62, 79194 Gundelfingen/Br., Germanio
Retejo de AVE: http://www.verduloj.org
Nia interreta diskutejo trovighas je Ipernity, tie serchu la grupon "Verduloj"

**Koncize:**

**1984 - 2014 AVE kunvenis por festi la 30-jarighon:**

Ni tradukis la Manifestojn 2014 de la Europaj Verdaj Partioj (trovebla sur www.verduloj.org)
- Federacio de Junaj Europaj Verduloj
- Europa Verda Partio

**Datumbazo de Esperanto-parolantaj organizajhoj** - kaj Maklerejo: http://per.esocom.de

La projekto http://www.**lingvo.info** celas provizi informojn pri lingvoj kaj diskonigi plurlingvecon en la interreto ...
La retejo estos havebla en almenaŭ 17 lingvoj ekde sia lanĉo.

**Internaciaj Ago-Tagoj** (nur kelkaj)
01-27 : Rememortago pri la kruelajhoj de la fashismo (liberigo de la koncentro-lagero Auschwitz)
02-21 : Internacia Tago de la Patrina Lingvo
03-08 : Internacia Tago por Virinoj
03-10 : Internacia Tago por la Autonomio de Tibeto
03-21 : Tago de la Mondcivitanoj
03-22 : Internacia Tago por la Akvo
04-20 : Tago de la Tero
05-09 : Europa-Tago
05-15 : Nakba-memortago pri la forpelado de araboj el la nov-fondita shtato Israelo (1948)
05-21 : Internacia Tago por la Kultura Evoluo
06-11 : Internacia Tago de la Lingvoj

=== **Detale** lau la dato ==== ===

2014-11-11 Koran Dankon al chiuj subtenantoj - por Mazingira kaj Kalima:
1. Por operacii la krurojn de du pliaj infanoj ni ricevis 400 de Ute kaj 90 en regiona renkontigho de BAVELO (Baden-Virtembergo). AVE pagis la „afrankon“.
Ni esperas ke tia mis-formigho pro vakcinado pere de Hhinino ne plu okazos.

2. Hans kaj Ans konvinkis nederlandan fonduson subteni „Akvo por Kalima“ per 4000.
Nun eblas al Etienne realigi sian planon provizi ch. 700 familioj kun salubra akvo, kiu kostos entue 10 mil. Mi raportos.

3. Eble vi legis en la lasta AVENO la kunsenditan raporton pri Mazingira ?
Daure trovebla jen: http://www.verduloj.org/mazingira.htm
Pluraj projektoj memstare funkcias nun, sed ankorau restas bezono subteni:
„Esperanto Secondary School“ en Marambeka, kies konstruon ebligis esperantistoj el pluraj europaj landoj, ankorau bezonas subtenon por pretigi la lastajn 3 klasojn (fenestroj kaj pordoj), instali la administrejon, bibliotekon kaj konstrui la laboratorion.
Putoj por nova alighita vilagho „Tiringati“ - kie eblus bori ghis 9 putojn.
Mramba Simba planis akvo-basenon por chiu vilagho por la ghardenoj kaj bestoj (po 7 mil euroj).

Kaj ankorau atendas orfoj - kiuj bezonas po 30 Euro por pagi la lernomaterialon ek de la 3-a klaso; en la mez-lernejo ili bezonas 50 Euro jare.
En 2014 estis 402 kiuj ricevis tiun bazan helpon.
Por 2015 ili esperas la daurigon kaj aliaj la komencon.

Denove la konto de AVE che UEA por via subteno: avex-z
Se vi ne estas UEA-membro vi povas pagi pere de la bank-konto de UEA:
IBAN: NL27INGB0000378964
BIC/SWIFT: INGBNL2A
Pago-rimarko: "al UEA-konto: avex-z , *rilato*, *vian nomon* „
Rilato povas esti: Mazingira orfoj, mezlernejo au puto.

===
2014-10-30 **„Niaj“ afrikaj projektoj progresas,** kaj bezonas vian subtenon.
Elkoran dankon al tiuj kiuj jam donacis por Mazingira (operacio de infanoj > sube)
kaj **„Akvo por Kalima**“.
Intertempe ni ricevis 5000 Eurojn de malgranda germana firmao Wasserkraft Volk AG.
AVE promesis pagi entute 1000, kaj jam 400 venis de Betty;
**se vi emas aldoni al la restantaj 600 estus bone** (aliflanke mi pagos).
Mi (mw) verkis detalan peton al germana duon-shtata fonduso (SEZ.de) sed tiu rezignis helpi, char ili devus elekti el multaj projektoj. Pro tio mi petis denove je WKV pri ghis 4000, kaj atendas.
La projekto bezonus 10 000.
**Pri tiuj 4000: Se vi estas tre richa** au konas richulon, bonvolu demandi - volonte mi sendos al vi la detalan priskribon de tiu projekto - jam sendita al SEZ.
Jen pri Kalima (D.R. Kongo): http://www.verduloj.org/afriko.htm

**Pri Mazingira** en Tanzanio - mi alkrochas la aktualan raporton de Mramba Simba, kiu montras la daurajn progreso-pashojn de la projekto Mazingira.
Chefe dank’ al Ute Haas kaj Christiane Lamy pluraj infanoj povis esti operaciitaj.
Koncize: tiuj estis vakcinitaj kontrau Malario (au jam havis malarion) en la postajhon, la hhinino (angle: quinine) kauzis diversajn tensiojn de la gambaj muskoloj,
kio sekvis la tordadon de piedoj au kruroj - aparte char la infanaj ostoj estas ankorau molaj.
Nun ili provas alian medicinon, artemisio.
Ankorau restas kelkaj infanoj, kies operacio kostos ghenerale 300 Euroj. Se vi preferas pagi por ili - ankau gravas. Mi metos du fotojn sur nian retejon:
http://www.westermayer.de/manfred/verduloj/mazingira.htm
http://www.verduloj.org/Mz-handikapitaj.htm
Jen la retejo de Mazingira en kvar lingvoj: http://www.kono.be/mazingira/eo.html

Char Martin Schaeffer nun laboras kiel ghenerala sekretario de UEA, li ne plu povas daurigi tiom intense la agadon de Fonduso Mondo, kiu tre subtenis tian agadon, aparte por germanoj, kiuj povis ricevi validan kvitancon por la financ-oficejo. AVE ja ne estas formala asocio.

Do, se vi subtenas - au prretas subteni - unu el la orfoj en la vilagharoj Ketare kaj Salama en Nord-okcidenta Tanzanio, ke tiu rajtas daurigi la lernadon, jaraj kostoj de 30 Euroj; se vi ne kontrauas vi povas elekti el inter multaj kiuj atendas, kiel persona subtenanto.

---

Je tiu-chi okazo mi dankas al tiuj kiuj pagis la (liberolvan) kotizon por AVE, de 5 Euroj (ankau eblas pli).  La konto de AVE che UEA: avex-z
Se vi ne estas UEA-membro vi povas pagi pere de la bank-konto de UEA:
IBAN: NL27INGB0000378964
BIC/SWIFT: INGBNL2A
Pago-rimarko: "al UEA-konto: avex-z , *rilato*, *vian nomon* „
Rilato povas esti: Mazingira orfoj au operacioj /  Akvo por Kalima / Kotizo

En Germanio vi povas pagi rekte al mia konto, Manfred Westermayer:
IBAN DE31680900000007868111.

Estus bone se vi informas min: AVE@verduloj.org au rekte: manfred@westermayer.de
Char la konto-informoj de UEA venas nur po-kvaronjaro.

Se vi intencas pagi grandan sumon (ek de 100) kaj bezonas validan kvitancon, mi sendos al vi la numeron de la kunlaboranta germana fonduso „Die Brücke“; sed mi ne volas tro-sharghi ilin per tiaj laboroj.

===
2014 ff Kalendaro de Esperanto-aranghoj
kelkfoje indas diskonigi konatajn aferojn plurfoje - chu ne.

Do, se vi serchas Esperanto-kunvenon, seminarion, ... au mem organizas - jen la kalendaro por la tuta mondo: http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm
Dankon al Laszlo Silvasi.

===
2015-07-25/08-01 Lille (Francio), AVE partoprenos la 100-an UK de UEA.

2015-08-01/07 Grezijono (Francio) AVE planas politikan seminarion (tuj post la UK) proksime al la UK en Grezijono (proksime).
Krom ekologiaj temoj, kaj politikaj diskutoj pri la nunaj krizoj, ni volas diskuti pri lingvo-politikaj postuloj kiel diskutenda temo okaze de la **Tutmonda Verda Kongreso 2016 en Bruselo.**
Samtempe Grazijono planas okazigi Festan Semajnon por infanoj kaj familioj ; post-UK-ekskursoj (konfirmenda)

**Por okazigi la AVE-Seminarion mi bezonas vian intereson** - do, se vi povas imagi vian partoprenon, bonvolu skribi al AVE@verduloj.org (au al manfred@westermayer.de).
Ankau ne-aj respondoj bonvenas, char mi ghojas ricevi vivsignon de vi AVEanoj de tempo al tempo. La Seminario estas malferma ankau por ne-membroj, sed tiuj ne rajtas vochdoni.
La kasteleto Grezijono trovighas en mirinde bela kaj ekologia chirkauajho.
http://eo.wikipedia.org/wiki/Kastelo_Grezijono
(retejo de la Esperanto-organizajho) http://gresillon.org

---

2015-08-02/09 IJK en Wiesbaden, Germanio - chu iu juna(j) AVE-ano(j) emas organizi verd-junulan kunvenon tie ? la IJK estos organizata de la italaj kaj germanaj junaj esperantistoj.
---

2015-08-09ff **Nitra** (Slovakio) **Kongreso de SAT.**
**Se pluraj AVE-anoj partoprenos**, ni povus mendi kunsidon de la ekologiista frakcio, la pozicio de AVE ene de SAT.
Se vi intencas bonvolu respondi al mi <ave@verduloj.org>, kaj chu vi pretas organizi la kunsidon.
---

2014-07 Burundo, Esperanto en Evoluo - evoluis
la projekto en Rumonge, Burundo, estas gvidata de Johan Derks. Tie ili sukcesis konstrui kulturdomon kun biblioteko. AVE iam sendigis lernolibrojn el Australio.
Kompreneble ankau tie estas bezonata mono por plia evoluo.
http://esp-evoluo.info/financado/donacoj/
===

**2014-07-11**, Vendredo, 17a- 18a horo, **okazis la AVE-Festkunsido okaze de la 30a jarigho** (enkadre de la 10a EEU-Kongreso en Rijeka, Kroatio )
Cheestis ch. 30 personoj, inter ili minimume 5 AVE-anoj. Ursula Niesert dekoris la salonon per sunfloroj, kaj prezentis ch. 300 bongustajn cherizojn - do, po 10 por chiu jaro & cheestanto.
Manfred rakontis koncize pri la estigho de AVE, kaj pri nia duflanka agado: por la Verdaj Partioj per Esperanto, kaj por subteni ekologie-sociale orientitajn evoluo-projektojn en Afriko. *

Temoj:
La Verdaj Partioj en Europo & Esperanto, sukcesetoj ek de 1984 - kiel atingi sukceson ?
La aktuala projekto traduki la „Manifeston de Europaj Verdaj Partioj“ estas en la fina stadio.
Por priparoli ekologiajn temojn ne restis tempo, char ni ricevis nur 45 minutojn.
Sed ni povis diskuti kion eblas konkrete fari rilate la Verda & Regionalista Frakcion en la Europa Parlamento:
- rememori la propedeutikan efikon de Esperanto
- peti subtenon por ke estonte en la Euroskola (en Strasburgo) povu okazigi denove sesioj, en kiuj Esperanto havos la rolon de interlingvo.
- en 2015 ni partoprenos la viziton de EU-instancoj en Bruselo, okaze de la UK en Lille;
kaj lau-eble okazigi denove „Verd-politikan Seminarion de AVE“ kaj eventuale viziti la Frakcion, au inviti EP-anojn.
- en 2016 okazos la Tutmonda Verdula Kongreso supozeble en Bruselo, kaj ni intencas aktive partopreni tie.

*) rilate Afriko: elkoran dankon al tiuj kiuj jam donacis por niaj Afrikaj Projektoj aparte por subteni la kun-financadon de  la dua sub-projekto „Akvo por Kalima“. Ni ricevos 5000 Eurojn de malgranda firmao Wasserkraft Volk AG, sed bezonos 10 000.
Dank al Ute Haas ni povos pagi la gambo- & piedo-operaciojn de du pliaj infanoj.
Nia UEA-Konto: avex-z
Se vi ne estas UEA-membro vi povas pagi pere de la bank-konto de UEA:
IBAN: NL27INGB0000378964
BIC/SWIFT: INGBNL2A
Pago-rimarko: "al UEA-konto: avex-z ,  Akvo por Kalima, *vian nomon* „

===
2014-06-07 Raporto de la kunveno de AVE en Erfurt, DE, por festi la 30-jarighon:
Ni kunvenis dum unu horo okaze de la Germana Esperanto-Kongreso en Erfurt. Estis ch. 10 partoprenantoj, inter ili 3 novaj AVE-anoj, membroj de la Verda Partio, respektive de ties junularo.
Kiel sekretario mi prezentis la kunagadon kun la Verdaj Partioj tutmonde.
Mi ankau prezentis niajn du evolu-helpajn projektojn en Tanzanio (Mazingira) kaj PIEADC (D.R. Kongo), bedaurinde mi forgesis okazigi monkolektan eventon; tamen ni ricevis per vendado de afishoj (Paco estas ...) kaj rakonto-broshuroj "Avo-fungo" 39,50 Euroj.
Sufichas por rajtigi unu junulon iri en lernejon. Por la operacioj de torditaj gamboj au piedoj - pro vakcinado pere de hhinino (quinine) - necesus ch. 100 Euroj.

Pri E.D.E: Mi ankau diskutis kun E.D.E., kiu ricevis iomete pli da vochoj en Francio, sed ne sukcesis kolekti la bezonatajn 4000 subskribojn en Germanio; lau mia kompreno, char la t.n. Unu Mondo Partio  konkurencas - jam pri tiuj malmultaj homoj kiuj pretas subteni aparte Esperanton dum la balotokampanjo por la Europa Parlamento.

Iu portis la informon ke la nova Eurodeputito/parlamentano de la germana OeDP (Ekologie Demokrata Partio) profesoro Buchner, kunlaboros en la frakcio Verduloj & Regionalistoj. Kiel specialisto pri atomenergiaj temoj, ili esperebIe bone kunlaboros.
Chu Esperanto sukcesos profiti el la fakto ke OeDP enmetis favoron al Esperanto en sian Europan Programon, ni vidos.

Mi vendis por AVE 3 librojn "Urboj por shanghi la mondon" de A. Cazetien, tradukita de Marie-Therese Lloancy, kaj
du "Ekologio de Homo" de Jurij N. Sokolov, tradukita de Tatjana Auderskaja.

Kelkaj interesighis pri la temo Homekologio ligite al al konceptoj de Homaraneco/Hilelismo de LL Zamenhof, pri kiu mi prezentis  koncizan informfolion de J. Karhan. Teorie ili povus alporti pacon en tiaj nunaj konfliktoj ene de Ukrainio kaj ene de la araba mondo.

Se vi volas subteni AVE-on pere de kotizo kaj/au donaco: nia konto che UEA estas avex-z, bonvolu mencii la celon (kotizo, Afriko, orfo, operacio),
La kotizo por AVE-kotizo restas che 5 Euroj, libervole paginde.
(Manfred Westermayer: ave@verduloj.org)
---

2014-05  Malario kaj virinaj malsanoj en Tanzanio
Mramba renkontighos kun virino kiu intencas fari filmon pri malario kaj la kurac-planto artemisio pri kiu esploras Philip Mateika en Bunda, TZ.

===
2014-05  Unua rikolto de sunfloraj semoj kaj produkto da oleo

Pri Sunflora oleo ni iom malfruis akiri la oleopremilon dum la pasintan jarfinon , Ni nur sukcesis kolekti cxirkau 32 tunoj da sunfloraj semoj kaj premis cxirkau 8400 litrojn da pura oleo kiun ni vendis kontrau 21 milionoj da shilingoj kaj ricevis profiton de cxirkau 5 milionoj da shilingoj ,,,

En Februaro kaj Marto 2014 Mazingira disdonis 2000 kilogramojn da Sunfloraj semojn al lokaj kultivistojn kaj la distrikto ankau disdonis 4000 semojn. Do ni esperas kolekti multe da sunfloraj semojn (esperebIe 100 tunoj) ekde Junio ghis Augusto dum la rikoltoj

La vetero tamen ne estas bona , pluvis multe en la mezo de Marto ghis meze de Aprilo sed poste mankas pluvon kaj la suno brilas tro forta. tamen ni esperas iom bonan rikolton se pluvos en la venontaj semajnoj.

===

2014-04 Eta raporto el Bona Espero
Malgrau tio, ke la infanoj nun iras en shtata lernejo, pluraj ankorau loghas sur Bona Espero.
Krom la zorgo por eduki orfojn estas alia - kiel skribis Ursula Grattapaglia:
Kiel dua statuta celo ni aktivas en la medi-protektado, en la plantado de centoj da fruktoarboj arboj kaj daŭripova agrikulturo por la memsufiĉo de la komunumanoj.

Sed la plej granda celo ĉiam estis kaj estas la esperanto kulturo en ĉiuj siaj aspektoj (biblioteko, kursoj, seminarioj, libro produktado, intervjuoj, prelegoj pri esperanto en diversaj eventoj, agdo por esperanto en Rotary International ktp.).
Ek de pasintjare post 55 jaroj da daŭra aktivado, nia estaro decidis restrukturigi la institucion kun siaj 9 domoj, la plantaĵojn kaj bibliotekojn kaj ni iom post iom forlasas la infanzorgadon kaj la lernejon.
En 2013 ni jam organzis 12 eventojn rilate Esperanton (grandaj grupoj de skoltoj (120 kaj 60) kiuj kampadis en nia bieno kaj lernis esperanton, rotariaj eventoj, tri eventojn de la organizita brazila esperanto movado, renkontoj de ekslernantoj de Bona Espero, tri koncertoj de violinorkestro de gejunuloj el favelo en brasilia en nia bieno dum esperanto eventoj kaj en la urbo, seminaro pri medi-protektado ktp.)
Bedaurinde la retejo momente ne ekzistas, sed sur vikipedio vi trovos detlojn:
http://eo.wikipedia.org/wiki/Bona_Espero

2014-04 BEMI produktas biciklistajn T-chemizojn
(Esperanto kaj france) http://www.horizonto.net/esperanto/bemi.html
Mi preskau forgesis ke ekzistas la Biciklista Esperantista Movado Internacia:
jen ilia retejo:http://bemi.free.fr/eo.html
Kaj jen bicikla vortareto en ch. 16 lingvoj: http://bemi.free.fr/biciklo/
==

03-08 : **Internacia Tago por Virinoj**

03-10 : **Internacia Tago por la Autonomeco de Tibeto** - rememore al la 10-a de Marto 1959 kiam en Lhasa okazis popola resurekcio kontrau la china okupacio - kaj la rememore al la 80 000 tibetanoj kiuj estis mortigitaj tiam.
La registaro ghis hodiau ne pardonpetis pri tio - sed postulas pardonpeton flanke de Japanio.
Malgrau tio, ke Tibeto havas la statuson de Autonoma Provinco, la homoj ne ghuas veran autonomecon. Dum la lastaj du jaroj 130 ge-tibetanoj membruligis sin, kiel protesto kontrau la malrespekto flanke de la registaro de Pekino. Intertempe oni trovis pli modestan formon - uzante la eblecojn.
---

2014-04-15 **Amasfinancado: „Trinkakvo por Kalima“ ghis fino de Augusto:**
Betty Chatterje klopodas monkolekti por la akvoprojekto de Etienne en Kalima, DR Kongo, per la amasfinancada retejo bonfaranta, caremaker.com.
Shi skribis:
Jen la ligilo de mia kampanja paĝo: http://caremaker.com/nc/campaign/i/water_is_life_34764/

Mi ankaŭ dufoje blogis angle pri la situacio. Jen la ligiloj

http://elinjo-lifeisahotch-potch.blogspot.dk/2014/04/water-is-hope.html

http://elinjo-lifeisahotch-potch.blogspot.dk/2014/04/dirty-water-is-death-clean-water-is-life.html
---

2014-01-26 Aktuale pri Mazingira:

Mramba Simba skribis: Chi tie chio iras bone, kaj dank al Esperanto Plus mi jam komencis instrui esperanton che Esperanto mezlernejo.

Li ankau zorgas pri la kuracado:
- pri infanoj kiuj - pro vakcinado per kinino kontrau malario - akiris misformigon de siaj kruroj au piedoj
- pri virinoj kun fistulo, li formale kunlaboras kun malsanulejo, kio faciligas la helpon.

Nun li estas en Dar Es Salaamo ekde chi mateno por viziti la operaciitaj misformitaj kruroj infanoj.

1.Susana Akweri kiu restis dum multaj monatoj en hospitalo nun bone fartas kaj mem povas pied-iri sen tenilo. Espereble se chio en ordo shi povus reiri hejme en la venonta semajno.

2.Mtani Juma 5 jara knabeto bone resanighas kaj morgau li ricevos specialajn shuojn kaj eble post 3-4 tagoj li reiros hejme.

3 Mose Nyabigeso bone resanighas kaj shi ankau deziros specialajn shuojn kiujn devus acheti de la nacia hosptalo , iom multe kosta char la shuo-mashinon de CCBRT hosptalo ne funkcias. do mi vidos morgau kun la plia konsiloj de kuracisto. espereble shi ankau reiros hejme chi semajne.

4.Mariamu Joseph, shi morgau ricevos lastan operacion kaj espereble shi restos en hospitalo ghis la mezo de Februaro, por shi ankau necesos specialijn shuojn.

5.Knabineto Tatu Sita kiun mi venigis antau 2 semajnoj kaj tuj la kuracistoj operaciis shin.

Chiuj bone fartas kaj rapide resanighas.

Evidente la operaciitaj infanoj bezonas apartajn shuojn, por kiuj necesas ankau mono.
Kaj denove montrighas infano(j) kun misformitaj kruroj - vidu sur nia retejo.
Do, se vi povus donaci por ili (eble adicie al via AVE-kotizo ?) - estus tre bone:
multaj malgrandaj donacoj helpas pli ol neniu granda.
Ret-ligo: http://www.verduloj.org/mazingira.htm
**nia UEA-konto: avex-z**
Subteni Mazingira eblas ankau pere de la Flandra Esperanto Asocio, Antwerpen.
IBAN: BE66000026533843, BIC: BPOTBEB1
Bonvolu noti "Mazingira (orfoj ...)" au operacio, lernejo, rearbarigo
===

**2014-01-01 Raporteto 2013 pri AVE**
La jara kolekto AVENO 39 (jaro 2013) estas kompleta - vidu: http://www.verduloj.org/39/kapo.htm

La chefa agado en 2013 estis redaktado de nia semajna reta bulteno AVENO, dankon al pluraj kiuj kontribuis per informoj kaj artikoloj. La retan AVENOn ricevas ch. 220 adresoj; nian retejon Verduloj.org vizitas tage inter 2-8 personoj.

**Financoj kaj Statistiko de AVE:**
La nombro da membroj ne multe shanghighis, dum 2013 alvenis kelkaj novaj, sed supozeble aliaj elfalis senkomente. Mi sendas la koncizan jar-kolekton de AVENO (#39) nur al aktivuloj kiuj ne havas ret-aliron, kaj kunportas por kunvenoj.
Char la kotizo estas libervole paginda, ne eblas nombri la ghustan membro-nombron.
En la man-kaso mankas ankorau 1200 Euroj. Nia UEA-konto sufichas por pagi la kotizon de AVE kiel fakasocio, kaj kelkfoje UK-partoprenon.
Ni ricevis kotizojn de 22 membroj (110 EUR), parte kune kun donaco (205 EUR) -
**Elkoran Dankon !**

**Diskuti ene de Verduloj:**
2012 ni shanghis la diskutejon al Ipernity, kiu uzas multajn lingvojn, i.i. Esperanton.
Tie vi povas rigardi la blogojn serchante: "Verduloj" en la kategorio Grupoj
Krome vi trovos jam plurajn "Dokumentojn" ankau sub "Verduloj".

**Afrika Agado:**
AVE subtenis la fishkulturan projekton PIEADC de Etienne Katchelewa en Kalima per 200 EUR;
kaj mi sukcesis denove ricevi subtenon de la germana firmao Wasserkraft Volk AG (post 5 mil por trinkakvo-kaj lernejo-projekto de Mazingira) - chifoje 3 mil Euroj por malgranda trinkakvo-projekto de Etienne por kvartalo kaj hospitalo en Kalima.
Por la projektaro Mazingira - por oleopremilo venis al la AVE-konto 60 Euroj - dank al tri apartaj donacoj al la Fonduso Mondo tiu projekto ricevis 1450 EUR.
Krome pluraj AVE-anoj subtenas regule orfojn en Mazingira Salama&Ketare. Sed M. ankau ricevadas grandajn subtenojn - parte surlokan praktikadon - el Francio, Belgio, kaj aliaj.
AVE-anoj subtenas evoluon de 3 subtenindaj afrikaj projektoj kiuj uzas Esperanton:
Tanzanio, apud Bunda - Mazingira
D.R. Kongo, Kalima, provinco Maniema - PIEADC

D.R. Kongo, Goma - SBV - Solidareco Bona Volo
Ni ankau kunlaboras kun aliaj agadoj en Afriko kiuj uzas Esperanton:
Vidu pli en nia retejo: http://www.verduloj.org/afriko.htm
---

**Eblas kunveni enkadre de AVE:**

2014-01 vi jam legis pri la AVE-kunveno okaze de la Afrika Kongreso en Cotonou. Bedaurinde la raporto estis nesuficha - ni ne ricevis novajn interesulojn. Mi ne scias, chu la partoprenintoj aprezis la kunsidon.
Mia konkludo: ne helpas multe al AVE, sendi libervolulojn kiuj ne estas aktivaj en la Ekologia-Verda Movado.

**1984-03-30 - 2014 AVE festas la 30-jarighon** - sed kiam kaj kie ?

2014-07-06/12 EEU-Kongreso en Rijeka: publika kunveno de AVE-anoj - nia temo ?? proponoj dezirataj. http://www.europo.eu/

2014-07- UK en Buenos Aires - kiu organizos la AVE-kunsidon ? Temo: Agendo 21 & Dauropovo en la Esperanto-Movado. http://uea.org/

2014-08-09/16 SAT-Kongreso en Dinan (Bretonio/Francio), AVE eble kunvenos enkadre de la Ekologiisma Frakcio de SAT: http://www.satesperanto.org/

**Tradukado por la Verdaj Partioj:**
Nia tradukado de la aktualigita Tutmonda Charto de la Verdaj Partioj (Dakar 2012) trovighas sur la retejo de globalgreens.org
Ni jhus tradukis la Manifeston 2014 de la Federacio de Europaj Junaj Verduloj okaze de la elektokampanjo al la Europa Parlamento; la malneto trovighas sur nia retejo: verduloj.org
Ambau tradukoj estis „menditaj“ de la koncernaj organizajhoj.
---

2014-01 **Bonaj novajhoj el Kalima**
Pri la agrikultura projekto, ghi bone evoluas. Ni celas nun kultivi kampegon por la maizo kaj la rizo. Eblus en septembro. La fridujo - por teni fishojn pli longe freshaj - serioze helpis.
La trinkakvo-projekto kiun subtenis la germana firmao WKV AG per 3 mil EUR estis finita: kvartala malsanulejo kaj 70 familioj nun havas aliron al bona trikakvo.
Denove dankon al chiuj subtenantoj. Etienne KATCHELEWA
---

2014-01-10 **AVE-kunsido okaze de la 5-a Afrika Esperanto-Kongreso en Cotonou, Benino**
AVE estis prezentita de Illiasou Boukari kaj Francois Hounsounou.
Unu el la temoj estis Recikligado. Anita el Svedio kaj Mirejo el Svislando prezentis la manieron dismeti la diversajn rubajhojn lau la konsisto.

Komento de AVE/mw:
lau mia eta inform-stoko: en Uganda oni jam malpermesis plastajn saketojn; en Ghana oni re-utiligas plastajn sakojn; kaj en Senegalio la fishistoj klopodas kolekti plasto-rubon el la maro.
Sed elektronika rubajho estas traktita lau dangera metodo - bruligi kablojn, por havi la metalon.